

AMERIKA ESPERANTISTO

# AMERICAN ESPERANTO MAGAZINE




*Esperanto in  
Monaco*

*"Kriŝ Kross"  
Puzzle*

*Fantazioj kaj  
Faktoj*

**MAY-JUNE  
1956**



# AMERICAN ESPERANTO MAGAZINE (*Amerika Esperantisto*)

*Official bimonthly publication of the*  
ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA, Inc.  
114 West 16 St., New York 11, N. Y.

## EDITORIAL STAFF

*Editor:* G. Alan Connor. *Co-Editors:* Dr. William Solzbacher, Doris T. Connor, Myron R. Mychajliw.

## SUSTAINING BOARD OF EANA

Dr. Luella K. Beecher, Dr. F. W. Breth, Allen L. Brown, A. M. Brya, John Burt, Carl W. Childress, C. C. Cummingsmith, S. M., Preston Davis, Jr. Dr. Lee-Min Han, Allan Hutcheon, Horace C. Jenkins, Paul J. Kovar, Dr. Francis A. Kubeck, Katherine Muttart, Merrill E. Muttart, Bertha E. Mullin, Paul E. Nace, George Hirsch, Dr. Ivy Kellerman Reed, Bertha F. Sloan, Harold S. Sloan, Dr. W. Solzbacher, Mazah E. Schulz, Jack M. Warner, Jr., Virgil Whanger.

---

## CONTENTS – ENHAVO

Let's Do Something About Esperanto! . . . . .	<i>Einar Dahl</i>	67
Esperanto in Monaco . . . . .		69
Esperanto in Action Around the World . . . . .		72
Esperanto for Religious Purposes . . . . .		74
Nova Fenomeno en Esperanto . . . . .		75
Buterpano – <i>Versaĵeto</i> . . . . .	<i>tr. Helene Wollschlaeger</i>	75
Esperanta Kroniko . . . . .		76
Ĉu la Esperantistaro Devas Toleri Tion? . . . . .	<i>La Redaktoro</i>	80
Diversaj Anoncoj de EANA . . . . .		81
"Kross" Puzzle in Esperanto . . . . .		82
Faktoj kaj Fantazioj pri Esperanto – <i>Recenzo</i> . . . . .	<i>D-ro W. Solzbacher</i>	84
Ukraina Danco por la Kongreso 1956 – <i>Bildo</i> . . . . .		92
Komentoj de S-ro Azorin pri I.V.E. . . . .		93
Deziraro Korespondi . . . . .		94

*Bildo sur kovrilo:* Somero en la montaro de okcidenta Kanado

---

Subscriptions in the United States and Canada: \$3.00 per year.  
Jarabono eksterlande por kalendara jaro: \$1.50 aŭ egalvaloro.  
Gratis to Members of the EANA.

Regular Membership in EANA – \$5.00 per year. Patron – \$10.00.  
H. S. or College Student & Armed Forces – \$3.00 per year.  
Sustaining Board – \$3.00 or more per month.

# AMERIKA ESPERANTISTO

Vol. 70

MAY-JUNE 1956

Nos. 5-6

## LET'S DO SOMETHING ABOUT ESPERANTO!

**Einar Dahl**

*Member of the Swedish Parliament*

*The following paragraphs are extracts from a speech delivered March 7, 1956, in the Swedish Riksdag (Parliament) by a legislator who has had considerable experience in international affairs as well as in the practical use of Esperanto. He previously was one of the leaders of the Teachers' Esperanto League in his country. The speech was delivered as part of a large scale foreign policy debate. It was translated for the American Esperanto Magazine from the Swedish original, as it appeared in Svenska Esperanto-Tidningen for April 1956. Some of Mr. Dahl's remarks obviously apply only to countries like Sweden where the government runs the radio, subsidizes nongovernmental organizations, etc. The general line of thought in this speech is relevant anywhere.*

The United Nations and its specialized agencies have accomplished a great deal in aid to underdeveloped areas, in the fight against disease and infant mortality, in the liquidation of illiteracy, and in other equally important endeavors, in which Swedish representatives have, naturally, played their full part. I should like to emphasize, however, that the great objective of the United Nations is of such decisive and vital importance that more must yet be done and that there is positive need for trying out new ways and means. One of the matters which I should like to mention in this context is the world language problem.

At its 1954 session in Montevideo, UNESCO (the United Nations Educational, Scientific and Cultural Organization) adopted a resolution recognizing that the auxiliary language Esperanto has great value for education, science, and culture. The Swedish delegates to the Montevideo Conference supported the Esperanto resolution.

At the meeting of the Council of Europe in the fall, a recommendation for experimental Esperanto teaching in five countries will come up for decision. In this matter as well, Sweden has supported the proposal in the preparatory stages.

There can be differences of opinion on the world language problem. Some people may call any efforts in this direction sterile and utopian. Some may object to Esperanto as a general auxiliary language or an instrument of understanding and friendship among the peoples, but it is impossible to deny the fact that Esperanto works in practical use, that the language can be utilized to the same extent as a national language, in speech and writing, in discussion and literature, that every year several thousand representatives from about 30 nations get together for a congress at which they exchange their views, that the Esperanto world organization has a well-organized network in about fifty countries. In other words: Esperanto is a practical tool in the service of mutual understanding. Esperanto works for the aims of the United Nations.

We ought to take the consequences of our attitude and step forward

from the well-meaning words of resolutions to action and practical application. On the domestic scene, we should give both moral and financial support to the unselfish efforts of those who work to overcome the language barrier and to facilitate direct contact from man to man. This may be achieved in a number of ways, including experimental teaching of Esperanto in the schools, financial support for such activities as an international youth exchange and international youth camps, subsidies for meaningful foreign travel, Esperanto lessons on the radio, and so forth.

This is not a matter involving huge sums of money and threatening the balance of our public budget. But it would mean a real step forward towards the ultimate aim of the United Nations. From a long range point of view, it may have great significance by enabling a larger number of individuals from the broad masses of the people to acquire a solid knowledge of world affairs and to take an active interest in them. Herein lies much of the hope that pressure from below will little by little make itself felt in the conference halls where the fate of mankind is decided.

---


**The new Brazilian Foreign Minister**, Senhor José Carlos de Macedo Soares, is an Honorary Member of the Brazilian Esperanto League. He was President of the Tenth Brazilian Esperanto Congress and had several books published in Esperanto when he was President of the Brazilian Institute of Geography and Statistics, which has been using Esperanto on a large scale for many years. He now is again President of the Institute, combining this position with that of Foreign Minister.

**In New Zealand's largest city, Auckland**, an Esperanto Road was dedicated last February 11. The Right Honorable F. L. A. Gotz, Member of the New Zealand House of Representatives, made the principal speech at the ceremony and affixed the first street sign.

**The French Prime Minister**, Guy Mollet, and the Dutch Prime Minister, Willem Drees, sent letters endorsing Esperanto to an Esperanto Conference held at Strasbourg, France, on the occasion of the recent session of the Council of Europe. The Right Honorable David Jones, Member of the British House of Commons and of the Consultative Assembly of the Council of Europe, was one of the speakers at the Esperanto Conference.

**The Italian Minister of Transportation**, Armando Angelini, and several members of the Italian Parliament have accepted membership on the Sponsoring Committee for the 27th Italian Esperanto Congress, to be held at Massa, in the Province of Carrara, in September 1956.

**The Austrian Railroad Administration** has decided to pay the cost of printing and mailing the Bulletin of the Austrian Section of the International Esperanto Federation of Railroad Employees. It also plans the publication of a travel folder in Esperanto. Train conductors speaking Esperanto will have a special badge indicating this on their uniforms, just like conductors speaking other languages. All railroad personnel (i. e. not only conductors) are now authorized again to wear the Green Star of Esperanto on their uniforms. This rule re-establishes a privilege first granted by the railroad administration in 1928, but lost under Nazi occupation.



*Prince Ranier and Grace Kelly view the beautiful harbor of Monaco.*

## ESPERANTO IN MONACO

THE recent marriage of the American motion picture star Grace Kelly with His Serene Highness Prince Rainier III of Monaco has aroused in the United States and elsewhere intense interest in the charming little principality on the Mediterranean shore. At about the same time, the news about the reestablishment of an active Esperanto organization in Monaco, under the honorary chairmanship of Dr. Robert Boisson, Mayor of Monaco and former Councillor of Justice, and under the presidency of Professor L. Sauvaigo, recalls Monaco's past glories in the Esperanto movement.

One of the predecessors of Prince Rainier, Prince Albert I, who reigned from 1889 to 1922, was a great friend and promoter of Esperanto. Having acquired fame as an oceanographer and a deep sea explorer (his autobiography is titled *La Carrière d'un Navigateur*, "A Navigator's Career") and having founded the Oceanographic Museum at Monaco and the Institute of Human Paleography at Paris, he was elected as a Member of the French Academy of Sciences. In this capacity, he was one of the twenty-two original signers of the famous Declaration on Esperanto issued in 1921. This declaration, signed at first by 22 members of the Academy of Sciences, including Prince Albert of Monaco, and in later years by 18 additional Members of the same Academy, called Esperanto "a masterpiece of logic and simplicity" and stated that "the adoption of the auxiliary language Esperanto in international relations would have consequences of immense importance for the progress of science." The signers advocated the teaching of Esperanto in schools for the training of scientists, its use at international conferences and in scientific publications, and the systematic preparation of technical dictionaries in the language.

The declaration in favor of Esperanto was one of the last statements Prince Albert ever signed. He was 73 years old at that time and died shortly thereafter. But some of the recommendations contained in that declaration had already been put into effect in Monaco. Dr. J. Richard, Director of the Oceanographic Museum founded by the Prince, was one of the pioneers of Esperanto in the principality. A report of one of Prince Albert's expeditions was published in Esperanto by the Oceanographic Museum as early as 1904 under the title *Scienca Krozado de la Ŝipo "Princesse Alice"* ("A Scientific Cruise of the SS Princesse Alice"). Dr. Richard signed as the author of this first Esperanto book ever published in Monaco. In 1905, the Bulletin of the Oceanographic Museum began to use

Esperanto, under the direction of Dr. Richard and his colleague, M. Léger.

The practical application of Esperanto was also promoted by another international institution with headquarters in Monaco: the International Peace Institute, established 1903, for the purpose of promoting the study of international law and arbitration and of publishing the results of such research. Its first publication of this kind in Esperanto was titled *Historio Resuma de l' Arbitracio Konstanta* ("Summarized History of the Institution of Arbitration"). Its author was Gaston Moch, a former French artillery captain who had become one of the outstanding advocates of international organization and peace as well as one of the leaders of the Esperanto movement. He was one of the most active members of the International Peace Institute in Monaco. In 1903, the year in which the Institute was founded, an Esperanto Society was established in the principality as a result of a series of articles on Esperanto which M. Moch had published in the daily newspaper *Le Petit Monégasque*.

Sporadic work for Esperanto had been started in Monaco even earlier. The first pioneer was E. Barbier, in 1900; he was joined later by E. Picot.

Between the two World Wars, Jean Gelder, owner-manager of the Hotel des Etrangers in Monte Carlo, and Marius Joly, of the Banque Nationale de Crédit, served as delegates of the Universal Esperanto Association in Monte Carlo, and leaders of the Esperanto movement in the surrounding parts of France, such as the famous journalist and novelist Georges Avril, Editor-in-Chief of the French daily newspaper *L'Eclaireur de Nice* and of the Esperanto monthly *Nia Gazeto*, sometimes participated in Monaco's Esperanto activities.

On May 8, 1955, a reception was held at the Yacht Club of Monaco for members of the Twenty-First Congress of the Esperanto Federation of the Provence. The Congress had been held at Nice, with guests from countries as far away as Australia and Indonesia. Many of the members and guests participated in a ship excursion to Monaco along the beautiful Riviera, and the enthusiasm engendered by this visit accelerated efforts leading to the resurrection of the Esperanto Society of Monaco.

The Riviera, with its cosmopolitan atmosphere and its residents and visitors from all parts of the world, has always been one area where the use of Esperanto as a practical and easy-to-learn world interlanguage evidently is particularly helpful. Those of us who have had the privilege of attending Esperanto meetings at Nice, Marseille or Cannes, will never forget the exciting vitality of these get-togethers and the tremendous variety of national, professional and ideological backgrounds encountered there. There is something in the air that favors friendship and cordiality, and there are many occasions where it is essential to break through the language barrier. Esperanto exhibitions at such places as the Trade Fair of Nice have been very successful. Before World War II, a tiny village high up in the Maritime Alps, not far from Nice and Monaco, was a favorite hideout for Esperanto-speaking vacationers from many countries. The name of the village is *Aspremont*, but in Esperanto it used to be called *Espermonto*. According to recent reports, it is now regaining its former popularity, and visitors in the past season included not only people from various parts of France, but also Esperanto-speaking guests from countries as far away as Japan, Morocco, and Germany. And just across the

Italian border, a new cosmopolitan vacation center named *Villeuropa* has been using Esperanto and attracting Esperanto speaking tourists.

A tiny principality like Monaco, with an area of just over half a square mile and a population of 20,000 (most of them aliens), may seem to many like an anachronism in this age of jet planes and atomic energy. It plays no role in power politics and technological progress, but is a land of sunshine, beauty, and gracious living. Nothing compares to the Mediterranean as you see it from the rock of Monaco and the height of Monte Carlo, and the fairy tale atmosphere of evenings on the Riviera is beyond description. The fact that the Princess of Monaco is a charming woman from Philadelphia and Hollywood will make the principality even more attractive to Americans. Those of us who speak Esperanto will be entitled to a plus in enjoyment when we go there, because conversation and friendship via Esperanto will open doors which remain locked to others.


---

**Scientific and technological periodicals** publish articles and summaries in Esperanto in ever increasing numbers. In the November 1955 issue of *Scienca Revuo*, organ of the International Association for Esperanto in Science, published in the Netherlands, Dr. W. P. Roelofs presented a bibliography listing 86 such periodicals. Although it is incomplete, on the one hand, and includes periodicals no longer published, on the other, the list demonstrates clearly that the need for such use of Esperanto is greatest in countries whose languages are not used on an international scale. The geographical distribution of the periodicals listed by Dr. Roelofs is as follows: Japan 49, Netherlands 12, Yugoslavia 5, France 3, furthermore 2 each in Formosa (China), Denmark, Sweden, Norway, and Finland, one each in the United States (the *Journal of Geophysical Research*, Baltimore), Brazil, Italy, Germany, Portugal, Algeria, and Morocco. Botany and zoology are represented by 12 journals (in Sweden, Norway, France, the Netherlands, and Japan), medical science and pharmacology by 11 (in France and Japan), geophysics, geology, and seismology by 6 (in the United States, Finland, Yugoslavia, and Japan), physics and chemistry by 8 (in Japan and the Netherlands), mathematics by 4 (in Italy, Portugal, Germany, and Japan), astronomy by 2 (in Finland and Japan), agronomy and horticultural research by 9 (in Denmark, Sweden, France, the Netherlands, and Japan).

**The Botanical Garden** in the Japanese city of Kameoka is using Esperanto in correspondence and promotional activities concerning the exchange of plants and flower seeds with countries throughout the world.

**The Journal de Médecine de Lyon**, in France, published a supplemental sheet to its Number 837, explaining why it adds Esperanto summaries to all its articles. The French medical journal quoted medical and scientific authorities such as Dr. Roux, Director of the Pasteur Institute in Paris, and Professor Maurice Leblanc, of the Academy of Sciences, on the value of Esperanto for international scientific cooperation. The same journal also prints French summaries of articles appearing in *Medicina Revuo*, a medical journal printed entirely in Esperanto, in Japan.

## ESPERANTO IN ACTION AROUND THE WORLD



**In Valencia, Spain**, the daily newspaper *Levante* recently featured an article by Enrique Taulet about the periodical *Valencia Atracción*, whose principal purpose it is to attract tourists to the city and stimulate interest in its history and art. "One of the greatest successes of our publication was an article in Esperanto," Señor Taulet wrote. "It produced a constant stream of letters from all over the world requesting additional information about Valencia."

**The French Esperanto Association** has recently received financial support of the cities of Millau, Vallauris, and St. Dié. In each case, the subsidy was voted by the City Council.

**In his report to Victoria University College** in Wellington, New Zealand, Dr. C. J. Adcock, Senior Lecturer in Psychology, emphasized the assistance which he had received through the use of Esperanto on an extended study tour through the European continent, Britain, Canada, and the United States, during which he discussed with leading psychologists and educators latest developments in his field of specialization.

**"Esperanto" toilet soap** is manufactured in Lisbon, Portugal. Each box contains a leaflet summarizing the structure of Esperanto.

**The Modern Language Association of America** held a conference on "constructed languages" at its New York Headquarters on April 14 and 15, under the chairmanship of its Associate Secretary, Professor Theodore Andersson of Yale University. It was organized in connection with the Association's Foreign Language Program, initiated by a grant from the Rockefeller Foundation. A great deal of information on Esperanto as well as on various aspects of the world language problem was presented on this occasion.

**One of the Esperanto classes held at Buenos Aires, Argentina**, by Alberto Vigliani, attracted so much public interest that a story about it was included in the widely circulated motion picture newsreel, *Semanario Argentino*.

**A Travel Hand Book** for the Dutch Province of Noord Brabant, published by the Provincial Association for Tourism, includes the addresses of Esperanto Delegates for all the cities and towns which it describes.

**The Journal of Yokohama Municipal University, Japan**, filled its entire No. 43 (December 1955) with a scholarly zoological research paper by Professor K. Tsumura. Printed in parallel columns, in English and Esperanto, the paper dealt with diatoms (a genus of microscopic unicellular algae) found in the Shichimen-zan area of Japan.



**The Belgian Railroad Administration** has issued two staff circulars, dated December 9, 1955, and February 7, 1956, encouraging railroad personnel to learn Esperanto, and authorizing the Esperanto Association of Belgian Railroad Employees to place informational and promotional bulletins on all bulletin boards for employees.

**The Irish Tourist Bureau (An Bord Fáilte Éireann) in Dublin** has just issued an illustrated leaflet in Esperanto under the title *Informoj por Vizitontoj* ("Information for Visitors"). It may be obtained, together with other literature about trips to Ireland, from Ireland House, 33 East 50th Street, New York City, or from the Irish Tourist Bureaus in Dublin, Belfast, Cork, and London.

**An Esperanto Printing Shop** now exists in Rio de Janeiro. It is owned by the Cultural Esperanto Cooperative in the Brazilian capital.

**The Swedish Esperanto Federation** states in its Annual Report that there are 63 affiliated Esperanto Clubs in the country and that headquarters has been informed of 113 Esperanto classes started in various parts of Sweden in the fall of 1955. Classes in Arboga, Borås, Valskog, and Skövde participated in a Europe-wide scheme of "coordinated Esperanto classes" promoted by the People's College of Zurich, Switzerland.

**The Bruno Vogelmann Chemical Products Corporation** in Crailsheim, Germany, reports excellent results of its advertising in the Esperanto press. The firm received a large number of inquiries and, as a result, was able to appoint sales agents for its products in countries where it had not been represented before. Several of its office employees are now studying Esperanto to enable the firm to use the language on an even larger scale.

**Italy woos tourists** by ever more numerous and beautiful travel folders in Esperanto. Latest additions to the list include a de luxe booklet on the health resort of Montecatini, in the Province of Pistoia. The Office of Tourism in the Province of Cremona has decided to print this year 200,000 folders in five languages, including Esperanto. This is the first time this particular organization uses the Interlanguage.

**The William Shakespeare Memorial Library** at Stratford-on-Avon recently held an exhibition of Esperanto translations of Shakespeare's plays and welcomed a delegation of the Esperanto movement headed by Miss Violet C. Nixon, a Vice President of the British Esperanto Association. So far the following twelve plays of Shakespeare's have been published in Esperanto: *Hamlet*,\* *Macbeth*, *King Lear*, *Julius Cesar*, *Anthony and Cleopatra*,\* *As You Like It*,\* *The Merchant of Venice*, *The Tempest*, *Midsummer Night's Dream*, *Troilus and Cressida*\*, *Romeo and Juliet*\*, and *The Merry Wives of Windsor*\*. In addition, *Othello* and *The Taming of the Shrew* are ready in manuscript form. *Hamlet* was translated by Dr. L. L. Zamenhof, author of Esperanto. *As You Like It*, in a translation by Dr. Ivy Kellerman Reed, of the United States, was presented at the 10th Universal Esperanto Congress, at Washington, D. C., in 1910. (Titles marked with an asterisk are available from the book service of EANA).

## ESPERANTO FOR RELIGIOUS PURPOSES

**The Quaker Esperanto Society** (*Kvakera Esperantista Societo*) unites members of the Religious Society of Friends from many countries in common endeavors for Esperanto and distributes Quaker literature translated into Esperanto. It has headquarters in Bristol, England.

**The 2500th anniversary of the death of Buddha**, which is now being celebrated in all Buddhist countries and throughout the world, has led to the launching of a monthly magazine *Jayanti -- Jubileo*, published by the Buddhist Council of Ceylon in Esperanto, English, Sinhalese, and Tamil. The editor is the Reverend Sanghano C. Njanasatta Thero, who was once an Esperanto teacher in his native Czechoslovakia, but became a Buddhist monk in 1938, and is now a naturalized citizen of Ceylon. The former Prime Minister of Ceylon, Sir John Kotelawala, is the sponsor of the magazine. Abbot Njanasatta also heads the Buddhist Esperanto Institute at Kolatena near Bandarawela, Ceylon.

**An International Catholic Conference**, organized by the Pax Christi movement, under the presidency of Cardinal Feltin, Archbishop of Paris, at Zaragoza, Spain, in September 1956, will use Esperanto as one of its official languages. All documents and official releases will be published in Esperanto as well as in other languages.

**The International Christian Esperanto League** (KELI, Protestant) will hold its Annual Congress at Jönköping, Sweden, from July 27 to August 4, 1956. All delegates will be accommodated and all meetings will be held at a famous People's College. At approximately the same time, from July 28 to August 2, the *International Catholic Esperanto Union* (IKUE) will celebrate its 26th Congress at Zaragoza, Spain.

**Confessions in Esperanto** may be heard every Saturday between 5:00 and 7:00 PM in St. Andrew's Catholic Church at Godesberg-Rüngsdorf, according to an announcement in the Church Gazette of the Archdiocese of Cologne, Germany. The languages in which confessions are heard are: English, French, Spanish, Italian, *Esperanto*, Polish, and Russian.

**In Sweden** a poster campaign, conducted by the religious daily newspaper *Dagen*, which is owned by the Pentecostal Churches, draws attention to regular religious broadcasts in Esperanto organized by Radio IBRA over the shortwave transmitter of Radio-Africa in Tangier.

**In a memorial meeting for the late Cardinal Innitzer**, Archbishop of Vienna, held by the Vienna Catholic Esperanto Society, several statements of the Church dignitary on Esperanto were quoted, for instance, his message to the International Catholic Esperanto Congress in Rome, 1950, in which he declared: "We know the beneficial role which Latin has been playing as a unifying liturgical language of the Catholic Church. Esperanto, however, should be used as a practical language of mutual understanding, as a bridge from people to people and from man to man, especially in the service of the apostolate and in the service of the establishment of genuine world peace. May it be more and more accepted by, and spread among, the Catholics of all countries."

## NOVA FENOMENO EN ESPERANTO

**P**RO la "granda venko" de UNESCO, ricevis la "heroo de Montevideo" de "The Worker Esperantist" en Anglujo kiel donacon ses jardojn da plej bona drapo por vestaĵo. Ĝojgita per tio, li tuj skribis al Ĉefdelegitino en Jugoslavujo por esplori, kion tie oni povas kudri por li el tiom da ŝtofo.

"Unu mallongan pantalonon," estis la respondo.

"Nu," pensis la heroo, "unu mallonga pantalono el tiom da materialo - tio estas io ne en ordo. Ĉu ŝi jam forgesis mian talion? Aŭ ĉu tajloroj en Jugoslavujo pensas ankoraŭ per burĝaj kategorioj kaj ne jam lernis en kolhozaj labori ĝoje kaj produktive? Mi demandu en aliaj landoj pri la eblecoj."

Li skribis al Delegito en Italujo kaj ricevis respondon: "El ses jardoj da drapo ĉe ni oni povas kudri por vi longan pantalonon kaj veŝton."

"Tio sonas pli bone," meditis la heroo. "Malgraŭ tio, ke socialismo ankoraŭ ne atingis tiun landon, tamen jam estas antaŭsignoj de baldaŭa revolucio. Sed mi esploru ankaŭ aliajn eblecojn." Post tio li skribis al sia bona amiko en Francujo.

"Jes," respondis la amiko, "bonaj kamaradoj en Francujo kudros por vi el ses jardoj da drapo pantalonon, veŝton kaj jakon."

"Tio estas kontentige," decidis la heroo. "Sed por havi interesan statistikon por mia Centro de Esploro kaj Dokumentado mi demandos ankaŭ en Usono, kion oni povas fari por mi el ses jardoj da ŝtofo." Li skribis al Usono kaj ricevis respondon:

"El ses jardoj da materialo oni povas kudri por vi en Usono longan pantalonon, veŝton, jakon, mantelon, ĉapon, kaj ankoraŭ restos sufiĉe da pecoj por flikaĵoj."

"Tio estas enigma afero," konfuziĝis la heroo. "Kiamaniere povas la materialo kreski? Mi skribu al ISAE, por ke la sciencistoj tie, kiuj okupiĝas pri ĉio, klarigu tiun strangan fenomenon, esplorante ĝin racie, laŭ marksista vidpunkto kaj dialektika materialismo, kaj donu sian teorion pri tiu enigma pligrandigo de materio."

Li skribis al ISAE kaj post kelkaj semajnoj ricevis jenan respondon: "Esplorante vian kazon, ni ne povis trovi iun ajn pruvon pri pligrandigo de materio. Sed esplorante vian pozicion en la Esperanto-movado, ni konstatas strangan socian fenomenon, kiun oni povas klarigi mallonge jene: Ju pli distance for de Jugoslavujo vi estas, des pli malgranda vi fariĝas."

— MRM

---

### BUTERPANO

Sub la kverko, dum vespero,  
Sun' lumkisas ĉiun glanon.  
Pri pasinto meditadas  
Mi kaj manĝas buterpanon.

Malleviĝas sun', kaj donas  
Lun' al mondo arĝentbanon;

Noktajn ĉarmojn ja mi ŝatas,  
Kiel ankaŭ buterpanon.

Solaferon mi bedaŭras,  
Sed ĝi ŝajnas naturplano:  
Ĉio, ĉio finon havas,  
Jes, eĉ mia buterpano.

El germana tradukis  
Helene Suche Wollschlaeger



## ESPERANTA KRONIKO

**Peter Tan**, 32-jara ĉina studento, kiu studis dum la pasinta jaro en Luther-Kolegio, Iowa, organizis kurson de Esperanto en la kolegio. En la ĵurnalo de la kolegio aperis artikolo pri li en kiu li diris: "Antaŭ ok jaroj mi havis du revojn -- iri eksterlanden por studi, kaj havi eblecon lerni Esperanton -- kaj nun ambaŭ revoj realiĝis. Estas preskaŭ nekredeble!" S-ro Tan venis el Hong Kong, kie li servis kiel Sekretario por Junuloj de la Ĉina Luterana Organizo. Dumvoje al Usono li haltis en Honolulu, kie li ĝuis tre agrablan viziton ĉe nia fervora samideano kaj kunlaboranto *Frato C. C. Cummingsmith*.

**F-ino Sybil Lock**, vizitanta instruistino el Anglujo, kiu dum la vintro instruis en Columbia, South Carolina, faris diversajn prelegojn pri Esperanto kaj pri siaj spertoj en "Esperantujo".

**A. J. Hutcheon** instruas Esperanton al grupo de dekdu geknaboj en sia urbo Claremont, ŝtato New Hampshire.

**Tri junulinoj en St. Paul, Minnesota**, *Florence Ricci, Carol McKane, Joan Bergman*, kiuj ĉeestis pasintjare la Jubilean Kongreson de EANA, vigligas la studadon de Esperanto en la klaso de *F-ino Josephine Downey*. F-ino Downey raportis, ke dek-kvin studentoj en ŝia klaso pri Latina lingvo ankaŭ studas Esperanton kaj per la helpo de la tri fraŭlinoj faras bonan progreson -- eĉ, laŭ ŝi, "superas min!"

**De D-rino L. A. DeVilbiss** ni ricevis interesan citaĵon pri internacia lingvo el nova libro "La Sekreto de la Hititoj" de C. W. Ceram: "La imperio de la Hititoj okupis ĉi tiun teritorion de la Proksima Oriento en la 13-a jarcento antaŭ Kristo. Ili havis ok diversajn lingvo-grupojn. Do, por siaj internaciaj dokumentoj, ili uzis la Babilonan kojnforman skribon. Eble la unua registrita uzo de internacia lingvo."

**Nova dumviva membro de EANA** estas *Byron Ela*, Baltimore, Maryland. S-ro Ela unue aliĝis al EANA en la jaro 1945, kaj depost tiam fervore kaj lojale partoprenas en la laboro de la Asocio. Li sukcesis interesigi sian kunulon, *Eugene E. Beck*, pri Esperanto, kaj la du altkreskaj, bel-aspektaj junuloj helpis vigligi la kongresan vivon de la tri pasintaj kongresoj de EANA en Nov-Jorko kaj Milwaukee.

**En la Altlernejo Bishop-Neumann**, Philadelphia, *Paul J. Mimplitsch* gvidis kurson de Esperanto por la junuloj en la lerneja Esperanto-Klubo. Dek-duo da knaboj regule ĉeestis la kurson.

**Kun granda bedaŭro** ni raportas pri la morto de malnova kaj amata pioniro de Esperanto *Berthold Schmidt*. Li mortis subite en Nov-Jorko je la aĝo 82. S-ro Schmidt estis dum multaj jaroj prezidanto de diversaj Esperanto-Klubo en Nov-Jorko, delegito de malnova UEA, kaj ĉiam plene kaj energie partoprenis la movadon. Bonhumore li estris kunvenojn aŭ ludis pianon aŭ gvidis la kantadon. Al la edzino *Louisa*, ankaŭ fervora esperantisto, ni esprimas sinceran kondolencon.

**La Esperanto-Klubo MOSAMO** en la Kolegio pri Minoj kaj Metalurgio, Rolla, Missouri, konsistis el 17 aktivaj membroj dum la studjaro 1955-56. La klub-konsilanto estas *Prof. J. M. Brewer*, Prezidanto de EANA.

**"Kaj la genepoj ankaŭ lernas"**, laŭ *Wilfred E. L. Todd*, kiu lastatempe raportis pri Esperanta rondo, kiun li gvidas por siaj genepoj dum ilia libertempo for de la lernejo. Por tiu celo li uzas la libron speciale verkitan por elementaj lernejoj "Mia Unua Esperanta Libro".


**De Lago Chargoggagoggmanchauggagoggchaubunagungamaugg** (jes, ekzistas tiu nomo) ni ricevis belan poŝtkarton de *Andrew I. Rogus*, kiu lastatempe translokiĝis al la ŝtato Massachusetts. Dum la vintro, S-ro Rogus kiel Prezidanto de la Esperanto-Societo de Nov-Jorko bone estris la kunvenojn kaj gvidis la studrondon.

**La Biblioteko de la Psikoanaliza Instituto de Nov-Jorko** serĉas Esperantajn tradukaĵojn de iuj ajn verkoj kaj artikoloj de Sigmund Freud. Informojn pri tio bonvolu sendi rekte al la *Abraham A. Brill Library, New York Psychoanalytic Institute, 247 E. 82 St., New York 28, N. Y.*

**En Adelphi-Kolegio**, New York, *Profesoro Siegfried H. Muller* uzas tri paĝojn de Esperanta teksto en sia nova lernolibro por instruo de Ĝenerala Lingvoscio (General Language Laboratory Manual). Dek-du frazoj sur unu paĝo estas tradukitaj en 39 lingvoj (inkluzive Esperanto) por ebligi interesan komparon inter multaj lingvoj. Aldone, Profesoro Muller kutime disaŭdigas por siaj geklasanoj la "Diskon pri Prononcado", kiun eldonis EANA antaŭ kelkaj jaroj, kaj ankaŭ presis la tekston de la disko en la nova libro.

**La urbo San Diego, California**, eldonis antaŭnelonge 4-paĝan ilustritan, kolorplenan prospekton kun unu paĝo de Esperanta teksto. La broŝureto priskribas la vidindaĵojn de tiu bela urbo en suda Kalifornio.

**J. J. Hutchens**, kiu instruis en la lernejoj de Canton, Ohio, raportis, ke liaj studentoj multe interesiĝas pri Esperanto, kaj al ĉiu li donas la libreton "Esperanto for Beginners" (Little Blue Book). S-ro Hutchens, je la aĝo de 70 jaroj, post 37 jaroj de instrua laboro fine pensiiĝis, kvankam li mem sentas, ke li ŝatus daŭrigi la instruadon dum multaj pliaj jaroj. La apuda bildo montras gimnastikan ekzercon de s-ro Hutchens, kiun li faris estante 68-jara. Kiam s-ro Hutchens antaŭ 2 jaroj interesiĝis pri Esperanto, hazarde okazis, ke en la sama urbo troviĝis *J. W. Hughmanic*, kiu studis Esperanton antaŭ dudek-kvin jaroj, kaj kiu fariĝis denove aktiva je la sama tempo kiel s-ro Hutchens. La du nun regule interkorespondas kaj interrilatiĝas pri propagando de Esperanto en Canton.





**El Gvatemalo**  
venis pere de  
*S-ino Consuela*  
*de Sánchez-La-*  
*tour* tre interes-  
aj informoj pri  
agado de Gva-  
temala Esperan-  
tista Asocio.  
La plej granda  
venko estis rez-  
olucio adopti-

ta pasintjare de la Unua Nacia Kongreso de Edukado, rekomdanta la instruon de Esperanto en la lernejoj de Gvatemalo. (Vidu detalojn en AE Januaro-Februaro). S-ino Sánchez-Latour mem publikigis diversajn grandajn artikolojn pri Esperanto en la luksa gazeto por virinoj "Mujer" kaj en literatura gazeto "Reflejos", kaj la Asocio okazigis ekspozicion de Esperanto en montrofenestro de unu el la centraj butikoj de Gvatemala Urbo. La fotografajo supre montras membrojn de la GEA okaze de festo en la hejmo de *Ges-roj Joaquín Robles Klee*. S-ino Sánchez-Latour troviĝas en la unua vico, la tria de maldekstre. La kvina en la lasta vico estas *D-ro Jules Bonge*, Prezidanto de la Asocio, kaj la oka en la lasta vico estas *Inĝeniero Héctor Sánchez-Latour*, Sekretario. Aliajn grupanojn ni ne konas, sed al ĉiuj ni sendas salutojn, kaj deziras pluan sukcesojn en la laboro por Esperanto.

**Praktika Utiligo de Esperanto** pere de gravaj internaciaj organizoj, estas la devizo de *S-ro Ralph Harry*, ĉefkonsulo de Aŭstralio en Genevo, Svisujo. Okaze de vizito al Usono kaj la Centra Oficejo, S-ro Harry, kiu estas fervora Esperantisto, denove emfazis tiun devizon kaj montris specimenojn de broŝuroj, kiujn pro lia instigo eldonis gravaj internaciaj instancoj, plejparte specialigitaj institucioj de la UN. Jen listo de tiuj organizoj, kiuj eldonis oficialajn informbultenojn en Esperanto: *La Interregistara Komitato por Eŭropa Migrado*, *La Monda Organizo de Saneco*, *La Monda Meteorologia Organizo*, *La Internacia Asocio por Socia Sekureco*, *La Internacia Unuiĝo por la Protektado de Infanoj*. Lastatempe S-ro Harry konvinkis la estrojn de la *Internacia Labor-Organizo* aperigi sespaĝan pagitan artikolon pri la ILO en la gazeto "Esperanto", kaj poste dissendi la samon kiel apartan flugfolion. La estroj nun konsideras la eblecon regule eldoni la ILO-Bultenon en Esperanto. En konferenco de Neregistaraj Organizoj, kunvokita de la Ekonomia kaj Socia Konsilantaro de UN, S-ro Harry aranĝis por ke estu disdonita dupaĝa oficiala dokumento pri la celoj de Esperanto kaj ties rolo rilate al diskriminacio bazita sur lingva diverseco. Estis ankaŭ pro la influo de S-ro Harry, ke la Aŭstralia Registaro faris du kopiojn de kolorfilmo pri Aŭstralio kun komentario en Esperanto de G. Alan Connor, Ĝenerala Sekretario de EANA. Laŭ freŝdata raporto de S-ro Harry, inter Decembro 1953 kaj Oktobro 1955 la filmo estis montrata en pli ol cent prezentadoj tra Eŭropo, je kiu ĉeestis pli ol 16000 personoj. Ĉiuj detaloj supre do montras la celkonscian laboron de nia eminenta samideano S-ro Harry, laboron kiu meritas pli ol simplan laŭdon.


**"Amerika Esperantisto" en bibliotekoj:** Multaj niaj membroj, konsciaj pri la graveco de tiu kampanjo, respondis tre fervore al nia alvoko por donacabonoj de AE. Kelkaj sendis po unu abono al sia biblioteko, aliaj donacis por kelkaj bibliotekoj. Jen la listo de tiuj, kiuj lastatempe donacis abonojn: *H. Smart* (10); *A. M. Brya* (10); *R. W. West* (2); *Mrs. C. Kauffman* (5); *Esperanto-Societo de Detroit* (10); *D. R. Broadribb* (15); *T. O'Neill* (10); *A. Hutcheon* (3); *P. Davis, Jr.* (3); *D. Walton* (1); *Wm. P. Vathis* (5); *D. Walton* (1); *C. Davis* (1); *E. Yungbans* (1); *P. E. Nace* (3); *L. Saari* (1); *P. Ziobro* (2); *A. Greene* (5); *J. J. Hutchens* (6); *Dr. Lee Min-Han* (10); *G. W. Bailey, Jr.* (10); *J. Bainbridge* (10).

La kampanjo ne estas finita. Ĉiu donacu, por ke en ĉiu loko estu "Amerika Esperantisto" en la biblioteko. Tio ankaŭ helpos en via loka propaganda laboro.


**Artikoloj kaj Leteroj al la Redaktoro** pri Esperanto aperis lastatempe en la jenaj ĵurnaloj kaj gazetoj pro iniciato de koncernaj membroj de EANA: "Indianapolis Herald", "North Bay Nugget" (*Robert Powell*); "Holiday" (*Henry Kruse, Jr.*); "Life" (*G. Alan Connor*); "San Antonio Light" (*S-ino E. Wollschlaeger*); "Canton Repository" (*J. W. Hughmanic*); "College Chips", ĵurnalo de Luther College, Iowa, kaj "Decorah Public Opinion" (*Peter Tan*).

**Ĉarma gasto el Indonezio**, *S-ino Ch. S. Datoe Toemenggoeng*, regalas la membrojn de la Esperanto-Societo de Nov-Jorko dum ĝia maja kunveno per tre interesa parolado kaj ekspozicio de varoj el Indonezio. (Vidu bildon dekstre). S-ino Datoe Toemenggoeng vojaĝis tra la tuta mondo, ĉie utiligante Esperanton por praktike helpi sin en kunvenoj kaj en paroladoj pri sia amata hejmlando. Ŝia parolado estis lerte farita en bela Esperanto, kaj speciale interesa estis ŝia klarigo pri matriarka familia sistemo de la gento, al kiu ŝi apartenas kaj de kiu fakte ŝi estas ĉefo. Ekzemple, ŝi diris, ke la edzo estas konsiderata nur gasto en la hejmo de la edzino. Li vivas kun sia patrino kaj fratinoj. Oni ankaŭ aĉetas edzojn por la filinoj, kutime per pago de la elspezoj de ties plua edukado. Se virino volas eksedzinigi ŝi nur diras "Saluton" al la edzo, kaj tio signifas adiaŭon. S-ino Datoe Toemenggoeng ankaŭ priskribis la nove kreskantan Esperanto-movadon en Indonezio, kaj montris specimenojn de la gazeto "Voĉo el Indonezio", organo de la Indonezia Esperanta Asocio. Niaj membroj, kiuj interesigas pri la "Voĉo" povas aboni ĝin pere de EANA. Ĝi aperas ĉiun duan monaton, 12-paĝa kun ilustrita kovrilo, kaj artikolojn en Esperanto kaj Bahasa Indonezia. Jarabono \$1.00. Per abono al "Voĉo el Indonezio" ni reale helpos al la juna Esperanta movado en Indonezio.





ĈU LA ESPERANTISTARO DEVAS TOLERI TION?



Samideano Jakson montras la finan rezulton pri UEA se la nova tendenco daŭros pli longe. Pripensinde tiurilate estas: la kreskanta influo de komunistaj landoj en administrado de UEA; la fakto ke tiuj voĉoj *devas* voĉdoni laŭ instrukcioj de la kompartioj en iliaj landoj; la stranga fenomeno de multaj voĉoj el Jugoslavujo; la oficiala sendito de UEA kiu samtempe estas sendito de Jugoslavujo por komunistaj propagando (vidu pagon 78, *Esperanto*, majo 1956); la pena strebado por akordi kun komunistaj landoj kaj celoj; la pena klopodo por forigi kontraŭkomunistojn kaj kontraŭkomunistajn E-asociojn. *Ĉu ni devas toleri tion?*



# The Esperanto Association of North America

---

## NIA KONKURSO PRI VARBADO DE NOVAJ MEMBROJ

**D**UM Aprilo kaj Majo aliĝis 35 novaj membroj al EANA. Preskaŭ ĉiuj el ili aliĝis pro leteroj al redaktoroj, kiujn skribis niaj membroj al diversaj gazetoj. Ni ĝojas listigi la jenajn niajn membrojn, kiuj depost Marto varbis novajn membrojn por EANA: *G. Fuller* (2); *D. Hathaway* (1); *J. Henry Kruse, Jr.* (7); *D. Walton* (5); *R. Powell* (2); *J. Glasscock* (1); *F. K. Immeke* (1); *F. Lee York* (1); *J. Hughmanic* (1); *J. Roth* (2).

En nia Konkurso la unuajn kvin lokojn okupas ĝis nun la jenaj: *Robert Powell* (9); *J. Henry Kruse, Jr.* (8); *Graham Fuller* (7); *Don Walton* (5); *Andrew I. Rogus* (3). El la pasintjaraj gajnintoj nur s-ro Kruse estas denove en la Konkurso. Pasintjare li gajnis la duan premion, "Ilustritan Vortaron de Esperanto, Vol I". Pro tio, ke s-ro Kruse ne povis utiligi ĝin, li dum la kunveno de Nov-Jorka Societo transdonis ĝin kiel donacon al s-ino Edna MacDonald, kiu antaŭe kopiis por li en Brajlan skribon la tutan vortaron el la Connor-libro. Tiu laboro daŭris preskaŭ la tutan jaron. Leterojn de s-ro Kruse la gazetoj ofte presas, ĉar li kelkfoje skribas kvazaŭ neesperantisto, kiu nur hazarde sciigis pri ekzisto de Esperanto.

Nun dum la somero, kiam oni havas libertempon, ĉu ne estas bona oportuno provi sian bonŝancon? Ni trovis, ke "Letero al Redaktoro" estas plej bona kaj plej efika propagand-maniero en Usono. Preskaŭ ĉiuj novaj membroj, kiuj nun aliĝas al EANA venas pro tiuj leteroj. Tial ni urĝe petas, ke ĉiu membro enviciĝu en la kampanjon. Se iu mem ne scias kiel skribi la leteron aŭ ne havas adreson de iu konvena gazeto, kiu eble presus la leteron, bonvolu skribi al ni kaj ni volonte liveros modelojn de la leteroj kaj adresojn de la gazetoj. Skribante "Leteron al Redaktoro" ne forgesu doni adreson de EANA por senpaga detala informo pri Esperanto.

---

*Novaj Membroj de la Subtena Komitato.* Koran bonvenon al la sekvantaj, kiuj lastatempe aliĝis al la Subtena Komitato de EANA: *Paul J. Kovar*, *Jack M. Warner, Jr.*, kaj *D-rino Ivy Kellerman Reed*.

*Ekstraj kontribuoj al la Subtena Kaso* estas ricevitaj lastatempe de la sekvantaj membroj: *Nina W. Rivers* \$5, *Peter Golobič* \$4, *Herbert W. Smart* \$1.25, *C. D. Prewitt* \$5, *Donald R. Jones* \$5, *A. Moiseman* \$5, *Preston Davis, Jr.* \$20, *J. Trytiak* \$1, *Pastro Martin Ignatowski* \$1, *Kanadano* \$2.50. Sinceran dankon al ĉiuj.

*Membro-Patronoj de EANA.* La jenaj personoj lastatempe renovigis sian membrecon en la alta kategorio de Patrono: *Edward Bleicki*, *Romaine Kraszewski*, *D-ro Lee-Min Han*, *S-ino S. S. Marks*, *Arlie J. Nixon*, *Kirk Sattley*, *Isabel P. Snelgrove*, *Eugene H. Thompson, Jr.*, *F. Lee York*. Koran dankon al ĉiuj.

★

**Wear the green star!** Every Esperantist should wear the green star to show his colors! See inside cover of AE for a varied assortment.

## "KRISS KROSS" PUZZLE IN ESPERANTO

*One of our soldier members, Sgt. James C. Faughnan, called our attention to the booklet "KriSS Kross Puzzles, Issue No. 3", which contained the interesting*



### QUIZZES AND SKILL - ERS

#### 2 Letters

Do  
*(then, so)*  
Je  
*(at)*  
Ni  
*(we, us)*  
Ok  
*(eight)*

#### 3 Letters

Dio  
*(God)*  
Fej  
*(fairies)*  
Ino  
*(female)*  
Iom  
*(some)*  
Iri  
*(go)*  
Jam  
*(already)*  
Nei  
*(deny)*  
Nur  
*(only)*  
Oni  
*(one, people)*  
Oro  
*(gold)*  
Tie  
*(there)*  
Unu  
*(one)*  
Uzi  
*(use)*

#### 4 Letters

Akvo  
*(water)*  
Alia  
*(another)*  
Apud  
*(at, near)*  
Bela  
*(lovely)*  
Boli  
*(boil)*

Devo  
*(duty)*  
Dika  
*(thick)*  
Hoko  
*(hook)*  
Jako  
*(jacket)*  
Kelo  
*(cellar)*  
Kiel  
*(as)*  
Kuko  
*(cake)*  
Lavi  
*(wash)*  
Meza  
*(medium)*  
Ofa  
*(frequent)*

Ordo  
*(order)*  
Plej  
*(most)*  
Pura  
*(pure)*  
Ridi  
*(laugh)*  
Rozo  
*(rose)*  
Sola  
*(alone)*  
Suda  
*(south)*  
Timi  
*(fear)*  
Urbo  
*(city)*  
Valo  
*(valley)*

#### 5 Letters

Afero  
*(business)*  
Amaso  
*(heap)*  
Amiko  
*(friend)*  
Amuzi  
*(amuse)*

## ESPERANTO

**It's easy, so they say, to learn this International language. Add to the fun of this puzzle by checking words you know.**

Danki  
*(thank)*  
Envii  
*(envy)*  
Eviti  
*(avoid)*  
Friti  
*(fry)*  
Fundo  
*(bottom)*  
Helpi  
*(aid)*  
Knabo  
*(boy)*  
Kombi  
*(comb)*  
Ostro  
*(oyster)*  
Patro  
*(father)*  
Soifi  
*(thirst)*  
Strio  
*(stripe)*  
Super  
*(over)*  
Sveni  
*(faint)*  
Tempo  
*(time)*  
Vitro  
*(glass)*

#### 6 Letters

Aprobi  
*(approve)*  
Aminda  
*(amiable)*  
Butono  
*(button)*  
Entute  
*(altogether)*  
Fiakro  
*(cab)*  
Insulo  
*(island)*  
Karoto  
*(carrot)*

Kvieta  
*(calm)*  
Ordoni  
*(order)*  
Organo  
*(organ)*  
Ornami  
*(ornament)*  
Oscedi  
*(yawn)*  
Severa  
*(strict)*  
Sukero  
*(sugar)*  
Terura  
*(awful)*  
Trompi  
*(cheat)*

#### 7 Letters

Akcepti  
*(accept)*  
Instrui  
*(teach)*  
Kanario  
*(canary)*  
Konkuri  
*(compete)*  
Okupata  
*(busy)*


#### 8 Letters

Aventuro  
*(adventure)*  
Episkopo  
*(bishop)*  
Lipharoj  
*(mustache)*  
Nekonata  
*(unknown)*  
Vendredo  
*(Friday)*

#### 10 Letters

Komercisto  
*(merchant)*  
Novedzinoj  
*(brides)*

*puzzle reproduced on these pages. Through the courtesy of Dell Publishers, we present the puzzle also for our members. We note one error in the text, but since to correct this would destroy the letter count, we shall let you find it! The error is noted along with the solution to the puzzle on page 94.*



FLECKO

"Remember, dear, we promised to share our work—  
so you do the dishes while I work the puzzles!"

# FAKTOJ KAJ FANTAZIOJ PRI ESPERANTO

## LIBRO DE D-RO IVO LAPENNA

D-ro William Solzbacher

LA INTERNACIA LINGVO – Faktoj pri Esperanto. *Redaktita originale en Esperanto de D-ro Ivo Lapenna, Eksprofesoro en la Universitato de Zagreb, Honorofica Direktoro de CED. 1954, Universala Esperanto-Asocio, Centro de Esploro kaj Dokumentado, Londono. 192 paĝoj. Havebla de la Libro-Servo de EANA. Prezo \$1.75 afrankite.*

EN Januaro 1954 la norvega parlamentano Carl Henry proponis al la Nobel-Komitato de la Norvega Parlamento, ke ĝi donu al Universala Esperanto-Asocio la Nobel-Premion por la Paco. La Estraro de UEA komisiis al sia membro D-ro Lapenna – kiu tiam ankoraŭ ne estis Ĝenerala Sekretario –, prepari dokumenton, en kiu la plej gravaj faktoj pri Esperanto kaj UEA estu kunigataj por submeto al la Nobel-Komitato. La klopodoj pri la Nobel-Premio bedaŭrinde ne sukcesis. Sed la Estraro de UEA trovis la raporton de D-ro Lapenna tiel interesa kaj utila, ke ĝi decidis aperigi ĝin en iomete plivastigita formo kiel libron.

La volumo konsistas el tri partoj sub la jenaj titoloj: (1) Esperanto kiel Solvo de la Problemo de Internacia Lingvo, (2) Esperanto-Organizaĵoj, Iliaj Celoj kaj Laboro, (3) Universala Esperanto-Asocio. En la “Enkondukaj Vortoj” D-ro Lapenna rekomendas al la legantoj, ke ili “atente tralegu ĉiun unuopan paĝon, eĉ ĉiun linion,” kaj ke ili uzu la libron kiel “novan batalilon en formo de taŭge ordigitaj faktoj.” Li diras, ke “ĉiu persono, kiu laboras sur la kampo de informado kaj ĝenerale klopodas disvastigi la lingvon, povos trovi en la libro abundan materialon por kunmeto de prelegoj, por verkado de artikoloj, por dokumentado de la afero de la Internacia Lingvo antaŭ diversaj instancoj.” Li ankaŭ proponas, ke la verko estu tradukata (li diras “tradukita”) en naciajn lingvojn.

Sendube fidinda kolekto de faktoj pri Esperanto kaj ĝia praktika uzo estas utila kaj necesa. La *Enciklopedio de Esperanto*, kiu estis (kaj ankoraŭ estas) valora arsenalo de informoj kaj argumentoj, aperis en 1934, kaj nova eldono ŝajne ne aperos en la proksima estonteco. Aliaj verkoj pri la historio kaj aplikado de Esperanto estas malgrandaj kaj ne kompletaj rilate la lastajn jarojn, ekzemple *Historio kaj Organizo de la Esperanto-Movado* de J. R. G. Isbrücker, aŭ, en angla lingvo, la unua parto de *Esperanto: The World Interlanguage* de Connor-Solzbacher-Kao kaj *The Language Problem* de E. D. Durrant. Libro kiel *La Internacia Lingvo* de Lapenna do respondas al vera bezono.

D-ro Lapenna kaj liaj kunlaborantoj kunportis grandan amason da utila materialo. La libro estas bele presita kaj bindita. Prezeraroj en la priskriba teksto (pri nomoj mi parolos poste) preskaŭ tute mankas. La divido en partojn, ĉapitrojn kaj subĉapitrojn kaj detala kaj zorge farita indekso ebligas rapidan trovon de informoj serĉataj. Eble tiuj faktoj kaj la reputacio, kiun D-ro Lapenna gajnis en la Esperanto-movado kiel kongresparolanto kaj reprezentanto de UEA en la UNESCO-Konferenco en Montevideo, klarigas la favoran akcepton kaj superlativan laŭdon, kiun la libro trovis en multaj Esperanto-gazetoj. Evidente la recenzintoj trarigardis la verkon rapide kaj ne sekvis la inviton de la aŭtoro, ke ili “atente tra-

legu ĉiun unuopan paĝon, eĉ ĉiun linion”.

La unua impresio, kiun mi havis, trarigardante la libron, estis, ke ĝi estis tre rapide – tro rapide – verkita, ke granda parto de la materialo estis nekontrolita aŭ nesufiĉe kontrolita kaj ke la kompilado de kelkaj ĉapitroj estis pli hazarda ol sistema. La rezulto estas, ke la libro enhavas centojn da eraroj, inter ili kelkajn tre gravajn, kaj ke partoj de la volumo estas tute fuŝaj. Tio serioze malpligrandigas la taŭgecon de la Lapenna-verko. Se iu senkritike fidas ĝin en verkado de artikolo aŭ en preparo de prelego, li riskas fari gravajn erarojn kaj malutili al Esperanto.

Eraroj kaj malklaraĵoj en la libro estas tiel multnombraj, ke estus tute neeble, menciigi ĉiujn. Aliflanke nura menciado de eraroj ne estus interesa por la plimulto de niaj legantoj. Mi opinias, ke estus pli utile, kombini kelkajn faktajn klarigojn pri gravaj aspektoj de nia movado kun mia recenzo de la Lapenna-libro. Tio faros mian artikolon pli longa, sed ankaŭ – mi esperas – pli leginda. La eraroj, kiujn oni trovas en la libro de Lapenna, oni povas dividi en du klasojn. Multaj el ili estas kaŭzitaj simple pro tro rapida kompilado kaj eldonado de la verko. Aliajn oni povas klarigi nur per la supozo, ke la aŭtoro skribis pri temoj, kiujn li ne bone komprenas. Estas tute evidente, ekzemple, ke li ne scias multe pri la historio de la Esperanto-movado kaj ke liaj ideoj pri ĝeneralaj lingvaj problemoj estas nesciencaj kaj amatoraj.

### **Lernolibroj kaj Ŝlosiloj**

La mallongaj ĉapitroj pri “Ŝlosiloj” (p. 45) kaj “Lernolibroj” (pp. 45-46) estas tute fuŝaj kaj plenaj de misinformoj. La lasta alineo diras: “Laŭ la statistiko entenita en la verko *Bibliografio de Internacia Lingvo* de P. E. Stojan, ĝis la jaro 1929 estis entute publikigitaj 1568 diversaj lernolibroj en 50 naciaj lingvoj. De tiam tiu ĉi nombro multe altiĝis kaj bodiaŭ ekzistas pli ol 2,000 diversaj lernolibroj en 84 lingvoj.”

Tio estas fantaziaĵo. Fakte ekzistas proksimume 950 Esperanto-lernolibroj en 53 lingvoj, kaj la Stojan-Bibliografio neniel diras tion, kion D-ro Lapenna citas. La nombro 1568 aperas en la “Resuma statistiko pri la verkaro lerna kaj propaganda en 50 naci-lingvoj (1887-1928)” kaj enhavas ne nur lernolibrojn, sed ankaŭ vortarojn, propagandajn kaj informajn broŝurojn kaj diversajn alispecajn verketojn. La nombro enhavas ekzemple 306 germanajn librojn, el kiuj nur 102 estas lernolibroj, 121 anglajn librojn, el kiuj 47 estas lernolibroj, kaj tiel plu. Fakte do la Stojan-statistiko enhavas proksimume 625 lernolibrojn en 46 lingvoj. Eble mi devas klarigi la ciferon 46 kompare al la 50 lingvoj menciitaj de Stojan. Stojan mem klarigas, ke la flandra lingvo estas la sama kiel la nederlanda (holanda) kaj la rutena la sama kiel la ukraina. Li mencias hindustaninan lernolibron, kies baldaŭan aperon li atendis, sed kiu neniam estis presita. Fine la “astura” lingvo estas menciata pro ekzisto de verketo nomita *Elementos de Esperanto – Diccionario Esperanto-Castellano-Asturiano*, kiu ŝajnas esti nek lernolibro nek en lingvo diferenca de la hispana.

En 1929 do ekzistis Esperanto-lernolibroj en 46 lingvoj. Poste aperis ŝlosiloj en la baska, romanĉa kaj sudafrika lingvoj kaj aliaj Esperanto-lernolibroj en la anama, tonkina kaj bretona lingvoj. Se oni aldonas tiujn 6 al la 46 kaj ankoraŭ aldonas Esperanton (pro la multnombraj lernolibroj

verkitaj tute en Esperanto), oni ricevas la nombron 53. Mi aŭdis kelkfoje pri Esperanto-lernolibroj en la korea kaj malgaŝa lingvoj. Sed mi neniam vidis informojn sufiĉe konkretajn pri ili kaj dubas, ĉu ili ekzistas. Ĉiukaze la fantazio de D-ro Lapenna pri du mil lernolibroj en 84 lingvoj havas nenian similecon al la realeco.

Lapenna donas liston de 34 lingvoj, en kiuj laŭ li aperis Ŝlosiloj "sub la aŭspicioj de UEA". Unu el la Ŝlosiloj, kiujn li mencias, ne ekzistas: la hebrea. Aliflanke 6 Ŝlosiloj mankas en lia listo: la baska, ĉeĥa, dana, finna, greka kaj judgermana. Esperanto-Ŝlosiloj do ekzistas en 39 lingvoj. La korekta kaj kompleta listo aperas sur paĝo 117 en *Esperanto-The World Interlanguage* de Connor-Solzbacher-Kao. Tamen kelkaj el la Ŝlosiloj, kiujn Lapenna mencias, neniam aperis "sub la aŭspicioj de UEA", ekzemple la kimra kaj la kataluna. Oni ne forgesu, ke Ĉefeĉ-Ŝlosiloj ekzistis jam antaŭ la fondo de UEA kaj ke *UEA komencis okupigi pri Ŝlosiloj nur en 1933*. La Internacia Propagandejo Esperantista de Ĉefeĉ fondiĝis en Londono en 1905 kaj tuj publikigis Ŝlosilojn en 7 lingvoj. Aliaj lingvoj sekvis. De 1924 ĝis 1933 la Internacia Centra Komitato de la Esperanto-Movado prizorgis la Ŝlosilojn.

D-ro Lapenna donas erarajn informojn pri la aperdatoj de la unuaj Esperanto-lernolibroj en diversaj lingvoj. Li skribas, ke la unua bulgara lernolibro aperis en 1903 (anstataŭ 1890), la unua dana lernolibro en 1908 (anstataŭ 1890), la unua persa lernolibro en 1915 (anstataŭ 1920), la unua rumana lernolibro en 1896 (anstataŭ 1908). Kelkajn lingvojn D-ro Lapenna tute forgesas en sia listo, kiu estas ekzemplo de misprolo kaj misdokumentado. Eble estas utile, ke mi nun prezentu fidindan liston de la lingvoj, en kiuj Esperanto-lernolibroj ekzistas, menciante la jaron, en kiu la unua lernolibro en la nomita lingvo aperis:

### Lingvoj kaj Eldonjaroj

albana	1928	hispana	1890	romanĉa	1931
anama	1932	hungara	1898	rumana	1908
angla	1888	islanda	1909	rusa	1887
araba	1907	itala	1890	serba	1907
armena	1909	japana	1906	slovaka	1907
baska	1936	judgermana	1888	slovена	1910
bretona	1932	judhispana	1912	sudafrika	1934
bulgara	1890	kataluna	1906	sveda	1889
ĉeĥa	1890	kimra	1910	tagala	1908
ĉina	1912	kroata	1909	tatara	1913
dana	1890	latina	1922	tonkina	1933
estona	1893	latva	1889	turka	
finna	1902	litova	1890	(araba alf.)	1909
franca	1887	malaja	1921	(latina alf.)	1953
friula	1922	nederlanda	1900	ukraina	1907
georga	1910	(holanda-flandra)		(rutena)	
(kartvela)		norvega	1907	visaja	1908
germana	1887	persa	1920	Esperanto	1905
greka	1907	pola	1887	(nur en Esp.)	
hebrea	1888	portugala	1892		

En 5 lingvoj (albana, baska, kimra, romanĉa kaj sudaŝrika) Ŝlosiloj estas la solaj Esperanto-lernolibroj ĝis nun aperintaj.

### Literaturo

Tre grandan parton de la libro D-ro Lapenna plenigis per informoj pri la tradukita kaj originala Esperanto-literaturo. Fakte proksimume 32 paĝoj (52-78 kaj 84-88) konsistas ĉefe el longaj listoj de aŭtoroj kaj verkoj. Pri kelkaj el ili D-ro Lapenna esprimas interesajn opiniojn (ekz. pri Kalocsay, Baghy, Hohlov, Szilágyi, Schwartz, Engholm, Schulhof kaj la Skota Kvaropo), pri aliaj li diras banalaĵojn aŭ sensencaĵojn (ekz. pri Jaume Grau Casas kaj Jan van Schoor, "kiuj bedaŭrinde limigas sian temon preskaŭ nure al la amo"!).

Por ordinara leganto estas malfacile kaj eĉ tede, tralegi la paĝojn plenajn de nomoj kaj titoloj. La valoro de tiaj listoj konsistas sole en la fakto, ke ili povas servi kiel fonto de informoj kaj bazo por pluaj studoj – kondiĉe ke ili estu inteligente kunmetitaj, zorge kontrolitaj kaj nepre fidindaj. En la verko de D-ro Lapenna ili estas fuŝe faritaj. Mi devas averti iujn gesamideanojn, kiuj eble intencas uzi ilin por propagandaj artikoloj kaj prelegoj, ke ili riskas ridindigi sin mem kaj malutili al Esperanto, se ili ne uzas la materialon de D-ro Lapenna kun severa kritikemo kaj senkompata malkonfido.

Mi esperas ekzemple, ke neniu kopios la misinformon sur paĝo 73, en kiu *La Floretoj de Sankta Francisko* estas atribuatataj al Papini. Tro multaj legantoj scios, ke la Floretoj ekzistis jam 600 jarojn antaŭ Papini!

Ĉiu, kiu iomete konas la brazilan literaturon, ridetos aŭ ridigos (laŭ temperamento) pri *Alencar: La Vidvineto de José Martiniano* (p. 74). La verko nomiĝas *La Vidvineto* (portugale *A Viuvinha*), kaj la aŭtoro estas *José Martiniano de Alencar*.

Parolante pri la rusa literaturo tradukita en Esperanton, Lapenna mencias tri verkojn de A. Tolstoj, *Princo Serebrjanij*, *Aelita* kaj *La Morto de Danton*, kvazaŭ ili estus de la sama aŭtoro. Ĉiu, kiu iomete studis la rusan literaturon, tamen scias, ke *Princo Serebrjanij* estas de Grafo Aleksej Konstantinoviĉ Tolstoj, kiu vivis de 1817 ĝis 1875 kaj estis pli aĝa kuzo de Leono Tolstoj. *Aelita* kaj *La Morto de Danton* estas verkoj de Aleksej Nikolajeviĉ Tolstoj, kiu vivis de 1882 ĝis 1945, elmigris eksterlanden dum la bolŝevista revolucio, sed revenis al Rusujo en 1922, faris pacon kun la komunista reĝimo, fariĝis propagandisto de Stalin kaj ricevis la Stalin-Premion en 1942. Estas malfacile kompreni, kiel iu povus konfuzi la aŭtoron de *Princo Serebrjanij* kun la Stalin-premiulo.

Simila konfuzo okazis al Lapenna pri la ĉeĥa literaturo (p. 66), kiam li mencias kvar verkojn de Karel Čapek: *R.U.R.*, *La Blanka Malsano*, *Skizoj pri Nederlando* kaj *Noveloj* (1934). Tiuj *Noveloj* publikigitaj en Esperanto-traduko de Moraviaj Esperanto-Pioniroj en 1934 ne estas de la aŭtoro de *R.U.R.* kaj *La Blanka Malsano*, kiu vivis de 1890 ĝis 1938, sed de Karel Matěj Čapek-Chod, kiu vivis de 1860 ĝis 1927.

Lapenna ŝajnas havi strangajn ideojn pri la lingvoj, el kiuj la verkoj estas tradukitaj. Kelkajn verkojn de la kataluna verkisto *Santiago Rossinyol* (kies nomon Lapenna persiste kripligas en la sensencan formon *Santiago de Ruysinol*, pp. 64, 74, 189) li enlistigas sub la *hispana* literaturo (*La Patrino* kaj *La Ĉiama Kantaĵo*, p. 74), alian sub la *kataluna* literaturo (*Folioj de la Vivo*, p. 64). Fakte ĉiuj verkoj de Rossinyol,

kiuj ekzistas en Esperanto (Lapenna ne mencias kvaran, *Cikadoj kaj Formikoj*), estas tradukitaj el la *kataluna* originalo.

Similajn misinformojn la Centro de Esploro kaj Dokumentado disvastigas pri *Salom-Aleĥem*, dirante, ke liaj *Hebreaĵ Rakontoj* estas tradukitaj el la hebrea lingvo, *La Gimnaziano*, *Ĉe Doktoro kaj Al Ĉiuj Egale* el la juda lingvo. *Ŝalom-Aleĥem* nenion verkis en hebrea lingvo, ĉion en *judgermana* lingvo. Lapenna ankaŭ eraras pri *Dibuk*, kiu estas tradukita el la *judgermana*, ne el la hebrea lingvo.

Aliflanke D-ro Lapenna ŝajnas opinii, ke la tuta Biblio estas tradukita en Esperanton el la hebrea lingvo. Li eraras. La Malnova Testamento estas tradukita el la hebrea lingvo, la Nova Testamento el la greka.

### **Bibliografiaj Informoj**

La bibliografiaj informoj en la Lapenna-libro ne nur enhavas multegajn erarojn (mi citis kelkajn kaj mencias aliajn poste), sed estas kunmetitaj en tute nezorga kaj nekompetenta maniero. Gravaj verkoj mankas, dum malgravaj broŝuretoj kaj eĉ fuŝaĵoj enestas. Oni havas la impreson, ke iu, kiu scias nenion pri literaturo, rapide trafoliumis la *Bibliografion de Internacia Lingvo* de Stojan, kopiante – kaj miskopiante – ion tie kaj ion ĉi tie, neniel atentante la rimarkojn de Stojan. La *Bibliografio de Internacia Lingvo*, kvankam ĝi enhavas kelkajn erarojn kaj neklaraĵojn, estas produkto de vera esploro kaj dokumentado, tre zorge farita kaj ĝenerale nepre fidinda. Mi jam menciis unu gravan kazon de miscitado el la *Bibliografio* sur paĝo 46 de *La Internacia Lingvo*. Jen alia ekzemplo: Inter la "sciencaj aŭ popularsciencaj verkoj aperintaj ĝis nun en Esperanto" Lapenna mencias sur p. 85 verkon de la iama Itala Ĉefministro Francesco Nitti, *La Paco*. Tamen Stojan sur p. 390 de la *Bibliografio* tute klare diras, ke de *Paco* ekzistas nur "sola presprovo de neeldonita verko, konservata ĉe UEA." Kial Lapenna mencias *neeldonitan* libron inter la verkoj aperintaj?

Alian libron li mencias dufoje, sur p. 85 inter la tradukitaj verkoj sub la titolo *Reiche : El la Mondbildo de l' Nova Fiziko*, sur p. 86 inter la originalaj verkoj sub la titolo *Muravkin: La Mondbildo de l' Nova Fiziko*. La du estas la sama verko; Profesoro Fritz Reiche estas la aŭtoro, Muravkin la tradukinto. En ĉi tiu kazo iomete kulpas la Stojan-*Bibliografio*, kiu ankaŭ mencias la verketon dufoje. Tamen inteligenta legado de la du priskriboj estus devinta sufiĉi por klarigi la enigmon. Sur paĝo 392 aperas la informo, ke Muravkin tradukis la verkon de Reiche; aperas ankaŭ bibliografiaj informoj pri la nombro de paĝoj kaj la formato. Sur paĝo 416 la titolo estas ekzakte la sama kiel sur paĝo 392 (Lapenna miskopiis, farante ĝin iomete malsama), kaj bibliografiaj informoj pri amplekso kaj formato mankas. Tio indikas, ke Stojan ne havis tiun verkon (kiun li opiniis diferenca de la alia) en siaj manoj, sed kopiis laŭ katalogo aŭ gazetanonco. Komercaj katalogoj de Esperanto-libroj bedaŭrinde estas nefidindaj kaj ofte intermiksas la nomojn de la aŭtoroj kaj tradukantoj.

Estus facile pleniĝi paĝojn per ekzemploj montrantaj, ke Lapenna ellasis gravajn verkojn kaj menciis malgravajn. En la parto pri la rusa literaturo li mencias 15 verketojn de L. Tolstoj. Kvin el ili estas broŝuretoj de malpli ol 20 paĝoj. Sed la plej grava kaj plej granda verko de Tolstoj aperinta en Esperanto tute mankas en la listo de Lapenna: *La Morto de Ivano Iljiĉ*, 126-paĝa libro aperinta en Riga en 1913. *Fjodor Do-*



stojevski, kies *Blankaj Noktoj* aperis en Esperanto en 1915, ne estas menciata.

Sub la greka literaturo D-ro Lapenna nur mencias du kantojn de la *Iliado*, parton de la *Odiseo* kaj tradukon de 31 poemoj en la *Eterna Bukedo* de Kalocsay. Mankas la plej grava verko, *La Nova Testamento*, mankas ankaŭ la *Fabloj de Ezopo*, *Plutos* de *Aristofano* kaj la *Grekaĵ Papirusoj* eldonitaj de Penndorf.

Inter multaj gravaj verkoj, kiuj mankas en la listoj de la Lapenna-libro, mi nur mencias la jenajn: Marshall Saunders, *Bela Joe* (*Beautiful Joe*, bela, bonstila 310-paĝa libro); Dorothy Canfield Fisher, *Infanoj kaj Patrinoj*; Jaroslav Hašek, *La Travivaĵoj de la Brava Soldato Ŝvejk*; Paul Boulet, *Franca Gramatiko por Esperantistoj*; la *Bhagavad-Gītā*; Toyokiti Takase, *Pri la Rilatoj inter Kemiaj Strukturoj kaj Fiziologiaj Agoj*; Naokazu Kawasaki, *Enciklopedieto de Kulturaj Vortoj* (2 volumoj); P. Lakšmi Narasu, *Budao*; M. Muller, *Rembrandt, la Magiisto*; S. Grenkamp-Kornfeld kaj Jan Brzekowski, *Pri l' Moderna Arto*. Mankas ankaŭ multaj gravaj religiaj libroj de diversaj religioj. Inter la antologioj mankas la 310-paĝa *Antologio de Brazilaj Rakontoj* (1953) kaj la jam aperintaj partoj de la *Aŭstria Antologio*.

### Nomoj kaj Titoloj

La buĉado kaj kripligo de personaj nomoj estas unu el la plej bedaŭrindaj malvirtoj de *La Internacia Lingvo*. Ekzemple mia malnova hungara amiko *Rustem Vámbéry* fariĝas *R. Vanbšéry*, Ŝajnas, ke tio ne estas nura preseraro sur paĝo 86, ĉar en la Indekso, sur paĝo 191, la sama senenca *Vanbšéry* reaperas. *Leibniz* fariĝas *Leibnitz* sur pp. 27, 70, 84, 114 kaj 186. Aliflanke *Kreuz* estas *Kreutz* sur p. 102, *Kreuz* sur pp. 137 kaj 185. *Ducommun* estas *Dicommun* (pp. 84 kaj 181), *D'Estournelles* fariĝas *D'Estroumnelles* (pp. 84 kaj 181), *K. Aars* estas *K. A. Ars* (pp. 86 kaj 179), *Posenaer* fariĝas *Posemaer* (p. 64), *Bäckström* fariĝas *Bockström* (pp. 65 kaj 180), *Krikortz* estas *Krikartz* (pp. 65 kaj 185), *Ström* estas *Strom* (pp. 66 kaj 190), *Vrba* estas *Vrbax* (p. 191), *Kloepfer* estas *Kloetffer* (pp. 72 kaj 184), *Gijsbreght* fariĝas *Gysbrecht* (p. 74), *Juzo Jamamoto* fariĝas *Junzo Jamamoto* (p. 76), *Kan Kikuĉi* fariĝas *Kon Kibuĉi* (pp. 76 kaj 184), *Ŝiga* estas *Ŝija* (pp. 76 kaj 190), *Tokunaga* fariĝas *Tokunoga* (pp. 76 kaj 190). Ni haltu momenton por paroli pri io alia. Sed ni revenos al la temo.

La libro de D-ro Lapenna faras strangan uzon de la streketo (-), ofte metante ĝin, kiam ĝi estas nekorekta, kaj forlasante ĝin, kiam ĝi estas necesa, ekzemple *Björn-Collinder* anstataŭ *Björn Collinder* (87 kaj 180), *Karlo-Verks* anstataŭ *Karlo Verks* (87), *Svenska Esperanto Tidningen* anstataŭ *Svenska Esperanto-Tidningen* (98), *Internacia Radio Revuo* anstataŭ *Internacia Radio-Revuo* (88), *Columbia Universitato* anstataŭ *Columbia-Universitato* aŭ *Columbia University* (90), *Paramount filmkompanio* anstataŭ *Paramount-filmkompanio* aŭ *filmkompanio Paramount* (107), *Brita Esperantista-Asocio* anstataŭ *Brita Esperantista Asocio* (113).

Tro multajn nomojn kaj titolojn Lapenna miskopiis el la *Stojan-Bibliografio*. La verko de L. Tolstoj, *La Kaŭkaza Kaptito*, fariĝis *Kaŭzaka Kaptito* (73). Grava japana scienca verko havas kvar aŭtorojn, kies nomojn *Stojan* donas senerare sur paĝo 393: *Tomosaburo Ogata*, *Shintaro Kawakita*, *Susumo Suzuki*, *Shigeru Kagoshima*. Lapenna fuŝis tiun nom-

aron, interesante la familian nomon kun la antaŭnomo de la unua aŭtoro, forprenante la familian nomon de la dua, donante ĝin al la tria, kopiante nur la kvaran (unu el kvar!) korekte, kun la jena rezulto: *Ogata Tomosaburo, Shintaro, Kawakita Susumu Suzuki, Shigeru Kagoshima* (85). Ĝusta kopiado el aliaj verkoj estas la plej elementa kondiĉo por "esploro kaj dokumentado", ĉu ne?

### Ŝanĝoj kaj Ortografio

En la titoloj de kelkaj verkoj la Lapenna-libro faras strangajn ŝanĝojn. Libro de Puŝkin aperas sub la titolo *La Damo de Piko* (73), kvankam la Esperanto-eldono nomiĝas *Pikregino*. Lapenna ĉiam nomas la Unuan Libron de Zamenhof *La Internacia Lingvo*; Zamenhof nomis ĝin *Lingvo Internacia*. Verkon de E. Drezen Lapenna mencias inter la *originalaj* verkoj sub la titolo *Historio de la Mondlingvo* (87 kaj 176). Fakte ĝi estis verkita en la rusa lingvo sub la titolo *Za vseobŝĉim jazikom – Tri vjeka iskanij*; la Esperanto-traduko farita de Hohlov kaj Nekrasov nomiĝas *Historio de la Mondolingvo*. La verko de Lanti kaj Ivon, *Ĉu socialismo konstruiĝas en Sovetio?*, estas nomata de Lapenna *Ĉu socialismo konstruiĝas en Sovetunio?* (87).

Ni nun reiru al la problemoj de la personaj nomoj. Por ilia ortografio oni povas uzi tri sistemojn: (1) skribi la nomon en la formo, kiun ĝi havas en la nacia lingvo, (2) Esperantigi ĝin, (3) uzi formon internacie konatan aŭ preferatan de la persono mem. Por personoj, kies gepatra lingvo ne uzas la latinan alfabeton, ekzistas nur la dua kaj tria eblecoj. Ekzemple por bone konata japana nomo la ortografio laŭ la dua regulo estus *Jamamoto*, laŭ la tria *Yamamoto*. Famkonata litova Esperanto-pioniro, kies litova nomo estis *Dambrauskas* kaj kies pola nomformo estis *Dąbrowski*, preferis en Esperanto la formon *Dombrowski*. Rilate la supersignojn kaj specialajn literojn en diversaj lingvoj oni ankaŭ povas uzi tri sistemojn: (1) uzi ilin ekzakte kiel en la nacia lingvo, (2) tute ellasi supersignojn, (3) uzi tiujn literojn kaj supersignojn, kiujn la presisto havas, forlasi la aliajn, aŭ anstataŭi ilin per simila litero. Neniu el tiuj sistemoj estas perfekta, kaj neniu verko simila al tiu de Lapenna povus solvi la problemon tute kontentige. Mi do ne riproĉas al D-ro Lapenna, ke li faris erarojn, eĉ multajn erarojn, sed ke li evidente verkis sian libron sen iu pripenso de la problemoj. Iu sistemo, kiel ajn neperfekta, estus preferinda al la kaoso reganta en *La Internacia Lingvo*. Kompreneble la uzo de la nacilingvaj formoj estus dezirinda en tia libro, ĉar ĝi volas servi kiel arsenalo por informa kaj propaganda laboro.

Sur paĝo 67 aperas la nomoj de du verkistoj uzantaj la judgermanan lingvon, unu sub la Esperantigita formo *Ŝalom Alehem*, alia sub la germana formo *Schalom Aŝch*. Kial *Schalom* apud *Ŝalom*? Lapenna estus povinta skribi *Ŝalom* aŭ *Solem*. Ĉar la verkisto naskiĝis en Polujo kaj poste fariĝis usonano, li estus povinta uzi la polajn formojn *Szalom* kaj *Szolem* aŭ la anglajn formojn *Ŝhalom* kaj *Ŝholem*. Sed Lapenna uzis *Schalom*. La pola ĉefministro *Cyrankiewicz* ricevas germanan antaŭnomon *Josef* (161). Lia pola nomo estas *Józef*; la Esperantigita formo estus *Jozefo*, la plej internacia formo *Joseph*; sed kial *Josef*? La pola antaŭnomo de Prus estas *Bolesław*, ne *Boleslav* (63). Ne estis necese fari el *Karl Marx* iun *Marks* (85). La hispanan romanverkiston *Vicente Blasco Ibáñez* oni ne povas nomi *Ibanez*, kiel faras Lapenna (74, 183). Lia familia no-

mo estis *Blasco. Ibáñez* estis la nomo de lia patrino. La kataluna Esperanto-verkisto *Pujolà i Vallès* fariĝas en la Lapenna-libro *Pujola y Vallés* (64, 188). Se oni volus doni al li hispanan nomon (sed kial? Li estis kataluna naciisto, elmigris el Hispanujo kaj fariĝis franca ŝtatano!), oni devus skribi *Pujolá y Vallés*.

Amuzaj aventuroj okazas al la nacilingvaj supersignoj sub la magia tuŝo de la Lapenna-plumo. Generalo *Sébert* estas *Sébert* sur paĝo 80, *Sebert* sur paĝoj 133 kaj 189. Germana fotofabrika estas *Hüttig* sur paĝo 101, *Huttig* sur paĝoj 86 kaj 183. *Tomáš Pumpr* estas *Tomaš* sur paĝo 66, *Tomáš* sur paĝo 77. Kroataj nomoj aperas en la ĉefparto de la libro en plene Esperantigita formo: *Mažuranić, Tadijanović, Šimunović, Krleja, Jelušić*. En la Indekso tamen subite aperas la kroata finaĵo *-ić*, sed la antaŭa parto de la nomoj restas Esperantigita. La rezulto estas monstraĵoj kiel *Jelušić, Mažuranić* kaj *Šimunović*. Speciala kuriozaĵo estas la nomo de *rusa* aŭtoro kun Esperantigita antaŭaĵo kaj kroatigita postaĵo: *Dorošević* (181).

La skribmaniero de kroataj nomoj en *La Internacia Lingvo* neniel helpas la celon de la libro. En usonaj gazetoj, ekzemple, oni devas skribi aŭ *Mažuranić* kaj *Krleža* (ĝenerale nur en filologiaj kaj fakaj revuoj) aŭ *Mazuranic* kaj *Krleza*. Kiel oni sciu tion laŭ la libro de Lapenna, se oni ne estas specialisto? Cetere sian propran nomon Lapenna ne Esperantigas. Stojan skribis al mi antaŭ du jaroj: "Lapenna ne estas logika. Se li uzas *UNESKO*, li konsekvence uzu *Lapeno*."

La nelogikaĵoj en la uzo kaj neuzo de supersignoj estas tro multnombraj en la libro por esti menciataj. Se Lapenna skribas *Szilágyi* (56, 65, 66, 108, 148, 150, 190) kaj *Molnár* (65, 187), li devus ankaŭ skribi *Antonín Zápotocký* anstataŭ *Antonin Zapotocky* (161, 192), *Rodó* anstataŭ *Rodo* (74, 189), *Cándido* anstataŭ *Candido* (74), *Camões* aŭ *Camoens* anstataŭ *Camos* (74, 189).

Kaoso ankaŭ regas pri geografiaj nomoj. Sur paĝo 176 aperas *Paris*, sur paĝo 177 (en la sama bibliografio) *Parizo*. Sur paĝo 147 oni legas *Munkeno* kaj *Kopenhago*, sed *Zagreb*. Sur paĝo 169 aperas *Zagrebo*, *Dresdeno* (Zamenhof skribis *Dresdeno*), *Bulonjo-sur-Maro*, sed *Praba, Washington* kaj *San Francisco*. Sur paĝo 166 aperas *Boulogne-sur-Mer*. *Gödöllő* (107) anstataŭ *Gödöllö* ŝajnas esti preseraro. *Winterpark* (50) devus esti *Winter Park*. *Krakov* (103) devus esti *Kraków*. Sur p. 169 estas *Krakovo*.

Por landnomoj D-ro Lapenna ĝenerale uzas *-ujo*, sed li ĉiam diras *Danlando* kaj *Pollando* -- kaj *Jugoslavio*. Tion li faras, ĉar "ne ekzistas jugoslava popolo", sed nur kroatoj, serboj, slovenoj kaj tiel plu. Simile oni povus diri, ke ne ekzistas belga popolo (nur flandroj kaj valonoj), brita popolo (nur angloj, skotoj, kimroj), nek ĉeĥoslovaka aŭ hinda popolo.

Kiam D-ro Lapenna uzas nacilingvajn terminojn, li devus uzi korektan ortografion. Brazila telegrafa bulteno ne povas esti *Boletin Telegrafico* (105), sen nur *Boletim Telegráfico*. La franca verko *Les Deux Maîtres* (71) devus esti *Les deux maîtresses*.

### Aritmetiko kaj Logiko

Frapa ekzemplo de nefidindeco estas la fakto, ke D-ro Lapenna havas malfacilaĵojn kun la elementa aritmetiko. Sur paĝo 33 li skribas: "La Universala Vortaro de 1894 enhavis 2599 vortradikojn. La ses oficialaj aldonoj de la Esperanta Akademio enhavas 1758 vortradikojn,

plus la nova sufikso *-end-*, entute 1759. *Sekve*, la oficialaj vortradikoj en la komuna uzo estas 4423." Kiel li faras tion? Kelkajn liniojn poste ni legas (p. 34): "Estas rimarkinde, ke el la 7866 radikoj en komuna uzo, la fundamentaj kaj oficialigitaj sumiĝas je nur 4425." Jen alia cifero! Cetere la "7866 radikoj en komuna uzo" estas produkto de lia fantazio: D-ro Lapenna enkalkulas ĉiujn vortojn en la *Suplemento al la Plena Vortaro*, de Waringhien. Vortoj kiel *basti*, *kirko*, *mirmekofago*, *megomo*, *volovano*, *magra*, *olda*, *pado*, *paŭti* certe ne estas en "komuna uzo".

Ne nur D-ro Lapenna ne majstras la belan arton de la elementa aritmetiko ( $2\,599 + 1\,759 = 4\,423 = 4\,425$ ), sed li eĉ ne sekvas iun regulon pri la skribmaniero de ciferoj en Esperanto. Kelkfoje li indikas la milojn per punktoj (2.599, 1.758, 1.759, 4.423, sur paĝo 33), kelkfoje li indikas ilin per komoj (5,262, 40,000, 1,228, 1,519, sur paĝo 162), kelkfoje tute ne (14500, 5642, 3000, sur paĝo 21). Kaj la Prezidanto de UEA diras en sia Antaŭparolo ion pri "laŭorde aranĝita, science objektiva verko"!

La logiko de la aŭtoro ne estas multe pli bona ol lia aritmetiko. En la ĉapitro pri *Faktoroj influantaj la lingvoevoluo*n li prezentas miksitan salaton el evidentaj faktoj, malbone komprenitaj faktoj, fantaziaĵoj, bonaj argumentoj, malbonaj argumentoj kaj absurdaĵoj. (daŭrigota)

---

## UNU EL LA DANCOJ DE UKRAINA DANCTRUPO KIU DISTROS LA KONGRESANOJN EN DETROIT



## THE BEST IN ESPERANTO LITERATURE - DE LUXE EDITIONS

<i>Kon-Tiki, Heyerdahl</i> , exciting true adventure story of six men on a 40-foot raft, 80 fotos, 236 pages, stamped in gold, full-cloth.....	\$ 3.90
<i>Gösta Berling, Lagerlöf</i> , strange, fascinating novel of adventure and love in rural setting of old Sweden, 552 pp, full-cloth.....	3.90
<i>Peer Gynt, Henrik Ibsen</i> , story in poetic form of wild adventure, impulsive love, colorful scenes of Norwegian life, 258 pp, cloth	2.35
<i>La Normandaj Rakontoj, Guy de Maupassant</i> , 19 delightful stories, richly illustrated, 210 pp, stamped in gold, grey-brown cloth.....	3.60
<i>Tipoj kaj Aspektoj de Brazilo</i> , fascinating details of the life of Brazil, 151 pp. incl. 36 full-page drawings, art leatherette bound	4.00

---

## KOMENTOJ DE S-RO AZORIN SENDITAJ KUN REKLAMO PRI I. V. E.

### *Akrido sur la I.V.E.*

Ĉu *Akrido* devenas de *akra*? La Ilustrita Vortaro de Esperanto diras tion, kio estas tamen, kiel ĉio, diskutebla. Sed, eĉ se ĝi estas erara, estas ridinde prezenti ĝin kun sep aliaj vortoj, kiel S-ro Waringhien kun siaj SAT-anoj, kiel puneblan kontraŭfundamentaĵon.

*Akrido* estas difinita en I.V.E., sub *akra*, kiel "saltinsekto, ido akra de la naturo. Lokusto." Science, de zoologoj, ĝi estas nomata *Lokusto*, (Gamaso lokusta). Tamen, la nomo *Akrido* estis konservata de Zamenhof en la Radikaro kaj en la Biblio (Ekz. Eliro 10:13). Latine la vorto estas *Acridum*, el *acris-idea*; Greke, *Akridion*, el *akros-ides*, el Skr. *akrish*=akrangulo, pinto, plus *vedah*=aspekto, figuro. Resume, do, akraspekta insekto, kiel dirite.

Egale klariĝas *Altaro, Amoniako*, kaj tiel plu pri ĉiuj 8.

Vere, ne estus novaĵo erari; "errare humanum est." Kio estas novaĵo, estas submeti la problemon al voĉdonado, peti de la Akademianoj plej-urĝan respondon, kaj minaci la verkon kaj aŭtoron per kondamno kaj ekskomuniko, sen honesta antaŭdiskuto. Kiu ne pensus, ke sub tio ĉio kaŝiĝas aliaĵo ol la nobla intenco defendi Esperanton?

### **Aĉetu senegalan verkon**

#### **ILUSTRITA VORTARO DE ESPERANTO (VOL. I: A-K)**

La unua vortaro de la Lingvo Internacia kun 10-lingva referenco por ĉiu radikvorto, kun bildoj specialaj, kun 666 paĝoj grandformataj, kaj la kunlaboro de diversnaciaj kaj diversfakaj kompetentuloj.

\$7.00 *bindita*, \$6.50 *broŝurita*, *afrankite*

**Esperanto Book Service, 114 W. 16th St., New York 11, N. Y.**



## DEZIRAS KORESPONDI



Kosto de anonco: Eksterlande, unu vorto aŭ mallongigo por unu cendo (ses vortoj por 1 int. respondkuŭono); Enlande, unu vorto por du cendoj.

**Francujo.** F-ino Blary, 9 rue Jean-Jaurès, Arles (B. du R). Serĉas korespondantojn por gelernantoj de Esperanto.

**Germanujo.** Hermann Gransch, Esserstrasse 15, Köln-Kalk. 26-jara, deziras korespondi.

**Japanujo.** Yoshinori Koakutsu, 3830 2-chio-me, Minami-Machi, Nerimaku, Tokyo. 13-jara deziras korespondi kaj interŝ. PM.

**Japanujo.** Kiyosi Matumoto, Kikusui 5, N-ro 35-6, Hyogo-ku, Kobe. 25-j. instruisto dez. kor. kun gekolegoj en ĉiuj landoj.

**Jugoslavujo.** Blanka Krog, Gvozdanska 24. V. R., Zagreb. 17-jara studentino de komerca gimnazio deziras korespondi.

**Svedujo.** Kerstin Rönnelid-Ström, Sveavägen 8 A, Värnamo. Sveda patrino kun du-jara kaj ses-jara filinoj deziras korespondi kun patro aŭ patrino por interŝanĝi infanobjektojn.

**Svedujo.** Sten Persson, Brevl. 861, Grännsby. Deziras korespondi kun negro-fraŭlino en Usono.

**Usono.** Stanley Otto, 20 Harvard Terrace, West Orange, N. J. Skoltestro dez. interŝ. informojn kaj novaĵojn pri skoltaj aferoj kun Germanujo kaj aliaj landoj.

**Ĉeĥoslovakujo.** Helena Hrudkova, Krupinska 115, 7, Zvolen. 30 membroj de Esperanto-Rondo dez. kor. kun gesamideanoj en Usono kaj aliaj transmaraj landoj. Interŝanĝas PM kaj il. PK.

**Kanado.** Howard Clark, 21 Kippendavie Ave., Toronto, Ont. Dez. kor.

**Pollando.** Antoni Breczko, ul. K. Napierskiego 11 m. 1, Białystok. Dez. interŝ. PM. kun ĉiuj landoj.

### INTRODUCTION TO ESPERANTO


The Universal Language

3rd Edition - Price \$2.00



Send on five days  
examination FREE.

Box 792, Placerville, Calif.



The error in the Kriss-Kross Puzzle is the word "fej" (fairy) under the 3-letter words. It should be "feo".

## POPULAR ESPERANTO BOOKS

*The Central Office is equipped to supply all your book needs. When you buy books from the "Esperanto Book Service" all profits are used to give you a better magazine and office. Place all your orders through the "Esperanto Book Service".*

- PRACTICAL ESPERANTO**, Dr. Wm. Benson. Many use this text for class or self because it is unique with 650 pictures to illustrate rules, affixes, vocabulary, etc. Grammar in English, exercises in Esperanto. 160 pp. illustrated..... \$ .25
- REED'S PRACTICAL GRAMMAR**, Dr. Ivy K. Reed. A very complete beginner's text for class or self, with extensive examples, dialog, etc. Offset reprint, a few pages slightly blurred but fully usable. 142 pp. with vocabularies and a complete index. Original price 75¢, reduced to less than half-price..... .35
- ESPERANTO: THE WORLD INTERLANGUAGE**, Connor-Solzbacher-Kao. The new complete manual of Esperanto. "6-books-in-1": history, textbook, reader, world directory, 2 dictionaries. All in one vol. 245 pp.....Paper \$1.50; Cloth 3.00
- COURS PRATIQUE D'ESPERANTO**, preface by Th. Cart. Complete text in French with exercises, Partie Élémentaire & Supérieure, 2 vols, 239 pp... 1.45
- ESPERANTO GRAMMAR & COMMENTARY**, Cox. A detailed and thorough analysis of Esperanto grammar in English, innumerable examples. 371 pp..... 2.00
- ESPERANTO (World Language Series)**, Prof. Mario A. Pei. Complete Esperanto chapter from "World's Chief Languages". Gram. survey, vocabularies, etc..... .25
- WORLD'S CHIEF LANGUAGES**, Prof. Mario A. Pei. A guide and survey of languages of entire world, incl. Esperanto. Maps, glossary, index. 663 pp....Cloth 6.00
- EDINBURGH DICTIONARY**. Esp-Eng & Eng-Esp. Excellent and complete, in concise form. The very best small dictionary for English speakers. 288 pp....Cloth .85
- MILLIDGE ESPERANTO-ENGLISH DICTIONARY**. Latest edition with 2nd, 3rd, 4th, 5th, & 6th "Aldonoj de la Lingva Komitato". Complete, 490 pp.....Cloth 2.50
- FULCHER & LONG ENGLISH-ESPERANTO DICTIONARY**. Incl. proper names and neologisms. Each meaning listed separately. Complete, 348 pp.....Cloth 2.35
- PLENA VORTARO DE ESPERANTO**, Grosjean-Maupin. Esp-Esp. The new latest edition, all-Esperanto dictionary with *Suplemento*, 511 pp., 4x5½.....Cloth 3.35
- SUPLEMENTO AL PLENA VORTARO**, separate edition, 6x8 in., 63pp..... 1.25
- FUNDAMENTA KRESTOMATIO**, Zamenhof & others. Authoritative chrestomathy and literary guide. Innumerable model stories, poems, etc. 472 pp.....Paper 1.85
- Latest edition, with additional foot-notes, etc., de luxe printing,.....Cloth 3.15
- KARLO**, Edmond Privat. Very popular easy first-reader, used in many classes. Life of Karlo as he grew from boyhood to young manhood and marriage. 43 pp... .25
- THE BIBLE in Esperanto (Sankta Biblio)**. The best "Reader". Beautifully printed. Bound in blue, art vellum, 8vo, latest ed. on excel. Bible paper. 996 pp....Cloth 2.50
- ESPERANTO SORTIMENTO**. Five books, good reading at low cost: *Akrobato de Nia Sinjorino*, legend of France, 25 pp; *Blanche-Virgolino de Lille*, medieval romance, 42 pp; *Lando de Argenta Akvo*, story of Far West, 48 pp; *Miserere*, music story, & *Tbais*, by Anatole France (2 bks in 1), 66 pp; *Rojujo Ciumljara*, the miracle of love, 48 pp. Each book 25¢. Entire sortimento for only..... 1.00
- RARE COLLECTION OF 25 ESPERANTO KEYS**. Albana, Angla, Araba, Baska, Ĉeĥa, Dana, Estona, Finna, Flandra, Franca, Germana, Hispana, Hungara, Italiana, Itala, Japana, Malaja, Norvega, Persa, Portugala, Romanĉa, Serba, Slovaka, Sudafrika, Sveda. Contains several rare items. Most complete collection... 2.75
- INDIAN BEAD STAR**. Genuine "Kiowa" work, tiny Indian beads on fine buckskin, round white ground with green star, beautiful rare art piece, 1 1/4" dia., brooch.. 1.00
- GREEN STAR PENDANT**. Round white ground with green star on both sides of pendant, nickel trim, eyelet & 1 link, for necklace or watch-chain, 1 1/16" dia... .75
- ENAMEL GREEN STAR**. Round white ground, gold trim, 7/16", button or brooch... .65
- On pentagonal white ground, with an E, gold trim, 7/16" dia., button or brooch... .65
- On star-shape ground, with E, white edge, gold trim, 10/16", button or brooch.... .65
- On round white ground, gold trim, 1/4" dia. (small), with 2" pin, tie-pin only..... .65

(Members of EANA deduct 10% from above prices.)

**Esperanto Book Service, 114 W. 16 St., New York 11, N. Y.**

## THE CONNOR COURSE IN ESPERANTO

Correspondence Course with Vinylite Records  
Instruction by Doris Tappan Connor

The "*Connor Course*" is unique, — it provides real-life disk conversations plus personal instruction. You *converse* with the disk and *confer* with the instructor. Compiled by experts.

The complete "*Connor Course*" includes the following:

- (1) A lively text, "*Esperanto: The World Interlanguage.*"
- (2) Eight "*Vinylite*" double-sided 10 records, 78 r.p.m.
- (3) A practical and easy-to-follow "*Study Guide*" (82 pp.)
- (4) Personalized instruction and guidance of *Mrs. Connor*.
- (5) Supply of answer paper and printed return envelopes.
- (6) An interesting card game, to develop your vocabulary.
- (7) And finally, an official "*Certificate of Achievement*".

*FOR INDIVIDUAL STUDY:* The complete "*Connor Course*", as described above, will be sent postpaid for *only* \$36.

*FOR GROUP STUDY:* Buy one complete *master course* at \$36. Each additional member pays *only* \$6 more for Textbook and complete *Study Guide* for his own use.

Full money-back guarantee. So, place your order *NOW*:

---

## LINGUAPHONE HOME STUDY COURSES

You can learn *ESPERANTO*, or any other language listed below, by the world-renowned *Linguaphone* Ear-Eye Method. Order through the *Esperanto Book Service* for benefits to both yourself and your Esperanto Central Office. You may select:

Esperanto	Russian	Swedish	Persian
Italian	Finnish	Hebrew	Hausa
Irish	Arabic	Bengali	Spanish
Polish	Japanese	Greek	Dutch
Chinese	Latin	German	Afrikaans
Malay	French	Czech	Hindustani
English	Portuguese	Norwegian	Effik

Regular list price for *Esperanto*, complete course, is \$57.50. Most other languages are priced the same. A few higher, a few lower — dependent upon number of records and other factors. Write to *Esperanto Book Service* about any language in which you are interested. Special payments for members of EANA.

---

**Esperanto Book Service, 114 W. 16 St., New York 11, N. Y.**